DEFALO DE USONO verkita de URSO (*Éric Bernard COFFINET*) el Francio 18/11/2024

Ekde jam pli ol unu jarcento Usono superregas la mondon per ĉiuj siaj potencoj ekonomiaj, sciencaj, kulturaj kaj militistaj. Ĝi ĉiam strebadis senkompate malfortigi siajn konkurencojn kaj mastri nafton, kiu similas al "nigra sango" nepra por vivigi nian modernan civilizacion. En 1971 la usona prezidento *Richard NIXON* malligis la dolaron disde la oro kaj naskiĝis la "nafto-dolaro", kiu estas la bazo de la usona fi-ekspluatado de la tuta mondo. Minaci ĝin estas nepardonebla "peko" mortiga : ĉiuj landoj, kiuj provis vendi sian nafton pere de eŭro, ege suferis kiel Venezuelo, Rusio, Libio kaj Irako, kie eĉ okazis militoj pro tiu kialo. Militoj en Afganio kaj en Sirio ankaŭ okazis, ĉar ties registaroj rifuzis konstruon de gasodukto tra sia lando, sed tie fiaskis la usonaj planoj.

Ĉion eblan faris Usono por apartigi Rusion disde Eŭropa Unio, kiun ĝi konstruis kaj ĝis nun regis je sia profito pere de perfidaj pajlohomoj enoficiigitaj de ĝi en ĉiuj eŭropaj landoj. Konforme al sia plano "usonanoj ene, rusoj ekstere kaj germanoj sube", anglo-usonanoj ne batalis dum la dua mondmilito (1939-1945) por liberigi Eŭropon de naziismo kaj faŝismo sed por kolonii ĝin kontraŭ Sovetio kun helpo de eksnaziistoj kaj eksfaŝistoj !

Post 1989 usonaj regantoj elektis malsaĝan kaj malbonan vojon. Kiam disfalis Sovetio, ili havis okazon por helpi Rusion per paca kaj fruktodona kunlaborado. Sed ĉar ili kredis je fabelo de la "fino de la Historio" kaj ebrie sentis sin "ĉiopovaj finvenkintoj", ili male provis daŭre plenumi siajn malicajn planojn kutimajn por dispecigi ĝin kaj prirabi ĝiajn naturajn riĉaĵojn.

Rezultas de tiuj tridek-kvin jaroj de militoj kaj de novliberalismo, kun milionoj da mortintoj, kun miliardoj da riĉaĵoj damaĝe malŝparigitaj kaj multaj landoj ruinigitaj, ke la usona superrego estas minacita kaj la nafto-dolaro malfirmigita kiel neniam antaŭe. Usono malfortiĝas en ĉiuj kampoj kaj sinkas sub sia nerepagebla monŝuldo "astronomia". Ĝi tamen provas kunigi ĉiujn siajn lastajn fortojn por fina batalo kontraŭ Ĉinio, sia plej grava konkurenco kreita de la freneza monavideco de grandaj internaciaj firmaoj pli potencaj ol ŝtatoj. Per milito en Ukrainio kun detruo de la gasodukto *NORDSTREAM* (Norda Fluo) ĝi ankaŭ sukcesas daŭre malfortigi sian vasalon kaj duan konkurencon, Eŭropo, kiun ĝi fakte "puŝis sub la buson" laŭ la averto de *Henry KISSINGER* : "malamiki kun Usono estas danĝere sed amiki kun ĝi estas pereige" !

Ĉu la prezidento *Donald TRUMP* sukcesos fari Usonon denove granda sed ne plu hegemonia por kunlaborado profita al ĉiuj sen tria mondmilito ? Jen estas la demando... Li annoncis, ke li ĉesigos la militon en Ukrainio tuj post kiam li oficiale enoficiiĝos en januaro 2025 kiel la 47a prezidento de Usono kaj ke li "purigos la ŝlimejon" de la "profunda ŝtato usona". La militemuloj, kiuj vivas kaj prosperas en ĝi, sentas sin en granda danĝero kaj provas rebati. La nuna kadukiĝinta 46a presidento *Joe BIDEN* por la unua fojo nun permesas al Ukrainio ataki la rusan teritorion per okcidentaj misiloj, kiuj povas trafi ĝis longaj distancoj, kvankam la rusa prezidento *Vladimir PUTIN* severe avertis ke tio kvazaŭ estus militdeklaro de Okcidento kontraŭ Rusio. Krome se *BIDEN* "malaperus" antaŭ januaro, tiam la vicprezidentino *Kamala HARRIS* oficiale fariĝus prezidentino de Usono portempe … kaj neniu scias kion ŝi faros!

Mi ĉiam esperas pri la plej bona sed pretiĝas kontraù la plej malbona...